***Ekzerco por lecionoj 33 kaj 34: Mira, Aventuroj de Detektivo (2)***

# Ĉu Alekso vere estas malbonulo?

*Ĉu la sekvaj frazoj estas veraj aŭ malveraj?*

1. La bildo de Alekso havas vundojn kaj bandaĝojn.
2. Filipa staras sur tri bareloj.
3. Mira scias la planon de Alekso.
4. Filipa aŭdas la planon de Mira.
5. Bozo saltas el la fenestro kaj kuras al Filipa.
6. La floro estas falsa: ĝi estas telefono.
7. Filipa estas la ĉefo de Alekso.
8. Alekso laboras en laboratorio.
9. Alekso estas bela en la bildo.

*****************************************************************************

***Ekzercoj por leciono 35: Mi portas sakon***

# Verve, verbe!

*La maldekstraj frazoj estas longaj formoj de la dekstraj frazoj. Kiu maldekstra frazo rilatas al kiu dekstra frazo?*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Mi ne prenas serpenton. | A: | Mi mallevas sakon. |
| 2. | Mi iras kun sako antaŭ mi. | B: | Mi portas sakon. |
| 3. | Mi movas sakon supren. | C: | Mi tenas sakon. |
| 4. | Mi diras: "Rigardu sakon!" | Ĉ: | Mi vidas sakon. |
| 5. | Mi movas sakon suben. | D: | Mi malfermas sakon. |
| 6. | Mi havas sakon en mia mano. | E: | Mi lasas serpenton. |
| 7. | Mi iras kun sako malantaŭ mi. | F: | Mi prenas sakon. |
| 8. | Mi rimarkas sakon per mia okulo. | G: | Mi montras sakon. |
| 9. | Mi ne lasas sakon sed enmanigas ĝin. | Ĝ: | Mi tiras sakon. |
| 10. | Mi iras kun sako sur mia ŝultro. | H: | Mi puŝas sakon. |
| 11. | Mi permesas al io eliri el sako. | Ĥ: | Mi levas sakon. |

# Kun aŭ sen la -N?

*Aldonu la ĝustan finaĵon al la speco. Elektu **-O** aŭ **-ON**.*

Mi prenas la sak__. Mi tenas la sak__ en la man__. La knab__ malfermas la sak__. La kat__ saltas el la sak__. Mi vidas la sak__ kaj la serpent__. La serpent__ estas apud la sak__. Mi tenas la sak__ super mia kap__ kaj mi malfermas la sak__. La serpent__ la knab__ lasas.

# Formu frazojn transe! Transformu ilin!

*Transformu la frazojn por krei pli interesan verbon el la kursivaj vortoj en la unua frazo. Metu la novan verbon en la spacon en la dua frazo! Ekzemple:*

Kato *saltas el* la sako ➔ Kato *elsaltas*.

1. Li *portas* la sakon *al* la ĝardeno. Li _________ sakon.
2. Li *grimpas sur* la branĉo. Li _________ la branĉon.
3. Li *venas al* la oficejo. Li ________.
4. La libro *havas en* si paĝojn. Ĝi _________ paĝojn.
5. La kato *saltas de* la tablo. Ĝi _________.
6. La fantomo *ŝvebas super* la barelo. Ĝi _________ la barelon.
7. Peco *falas el* la dento. Peco _______.
8. Bozo *iras kun* Riko. Bozo _______.
9. Roĝero *skribas pri* la familio. Li ________ la familion.
10. Ĝila *iras el* la domo. Ŝi _______.
11. *Rigardu el* la fenestro. _________!
12. La instruisto *venas inter* la batalantoj. Li __________.
13. Roĝero *skribas* sian nomon *sub* la teksto de la letero. Li ______ la leteron.
14. Kati *prenas sur* si puloveron. Ŝi ________ ĝin.

# Numeroj promenas

*Jen la numeroj de unu ĝis dek. Sed ili promenas. Kelkaj estas malgrandaj, kelkaj estas mez-grandaj, kelkaj estas grandaj. Vi havas kvin taskojn.*

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *2* | *6* | *4* | *8* | *9* | *1* | *5* | *10* | *3* | *7* |
| *A* | *A* | *E* | *I* | *K* | *M* | *M* | *O* | *T* | *T* |

**Tasko 1:** Montru la numerojn de maldekstro al dekstro kaj diru ilin.
**Tasko 2:** Diru la numerojn laŭ la grandeco. Komence diru kiu estas la plej malgranda. Fine diru kio estas la plej granda.
**Tasko 3:** Unu lernanto diru la numerojn en la ĝusta ordo. Dua lernanto skribu la literojn de la numeroj. Kiun vorton vi ricevas?
**Tasko 4:** Montru la numeron kiu donas vian aĝon. Montru la numerojn, kiuj donas la aĝojn de viaj fratoj kaj fratinoj.
**Tasko 5:** Diru faktojn por ĉiu numero. Ekzemple: 4 = piedoj de hundo.